

# LA LAMPIRO

60-a jaro, numero 157, 2019: 3



La esperantistoj en la Paraíba Valo

# LA LAMPIRO

60-a jaro, numero 157, 2019: 3

## Organo de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

**Redaktanto:** Paulo Sérgio Viana (psviana@terra.com.br)

**Graficarangô:** Cristovão Rocha Sousa

**Revizianto:** José Roberto Tenório



*La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj artikoloj*

### Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Fondita en la 29-a de Marto 1937

### Propra Sidejo

Rua Faustolo, 124 - Água Branca  
05041-000 São Paulo, SP - Brazilo  
Telefonnumero: +55 (11) 3862-1183  
easp.org.br | contato@easp.br

### Jarkotizo por 2019

Simpla membro.....R\$ 150,00.  
Subtena membro.....R\$ 300,00.  
Ŝtatinterna membro.....R\$ 75,00.

### Deĵoroj:

merkredo: 15h - 17h; jaŭde kaj  
vendredo: 13h - 17h; sabate: 9h - 12h

(escepte en la lasta sabato de ĉiu monato, kiam la  
deĵoro daŭras de la 9h ĝis la 18h)

### Estraro

**Prezidanto:** Genildo Martins Coelho

**Vicprezidanto:** Marcos Zlotovich

**1-a Sekretarino:** Anna Lobo de Carvalho

**2-a Sekretarino:** Sidnéia da Conceição Beall

**1-a Kasisto:** José Roberto Tenório

**2-a Kasistino:** Neide Aparecida de Freitas

**Propaganda Direktorino:** Cristina C. de Graaf

### Konsilantaro

Paulo Sérgio Viana, Audino Castelo Branco kaj  
Aparecida de Souza Araújo

### Anstataŭantoj

José Mauro Progiante kaj José Martins Coelho

# ENHAVO

6

Pentraĵo sur muro

11

Nia Kongreso

12

Esperantistoj denove kunsidis en la Paraĭba Valo

15

Retejo por trafa informo pri E-O

15

Revuo "Esperanto" Voĉlegata

15

Internacia gasto

16

lom da poezio kaj tradukarto

17

Invito al 13-a Esperanta Kongreso de la Ŝtato San-Paŭlo 2019

18

Pri kino kaj aliaj artoj: XXY

20

Nuda viro de Fernando Sabino

22

Manifesto

23

Ni ne atendu malesperiĝon por havi kuraĝon

25

Psikologio: pri la graveco koni sin mem

27

Rotario unuigas talentojn kaj ideojn kun la celo krei daŭripovajn plibonigojn en la mondo

LA

Lampiro

## Vortoj de la prezidanto

Finiĝis la unua semestro en 2019. Nia asocio plu alfrontas gravajn problemojn, sed ni fidas je nia idealo por plu batali por ĝia bonfarto. Ni fidas je la membroj, kiuj fidele plu apogas la asocion per sia ĉesto. Kaj ni alvokas la ceterajn, kiuj certe pro nura malatento forgesis aniĝi, ĉijare. Ni bezonas vian helpon, ne nur financan, sed efektive

partoprenan. Nia asocio ne povus sin teni sur la ŝultroj de nura manpleno da obstinuloj. La organizado de nia ŝtata kongreso bone progresas, sub la ĉefa (kaj tre



### KOVRILO

Shigueco Takahashi kaj la statuo en omaĝo al Zamenhof

kompetenta, sindona) loka gvidado de nia samideano Gilberto Menegasso. Kvankam la kongreso ĉijare estos nelonga (apenaŭ dutaga), tamen la programo estas densa, riĉa kaj amika. Nepre aliĝu amase, karaj EASP-anoj!

### GENILDO MARTINS COELHO



P. S. VIANA

Redaktoro de La Lampiro.

### Vortoj de la redaktoro

Post iom da lamado koncerne akuratecon, jen reaperas antaŭ vi nia Lampiro. Ni klopodas rekapti la ĝustan tempoaperadon. Por tio, ni devis fari ŝanĝon en la grafika laboro. Nia irana amiko Saggad Dashti, kiu belege fasonis la lastajn numerojn de nia revuo tamen troviĝis troŝargita de laboro, kaj ne povis obei nian aperoritmon. Ni

devis peti helpon de alia grafikisto. Restu ĉi tie niaj plej varmaj esprimoj de danko kaj rekono pro la laboro de Saggad Dashti, kiu volontule servis al ni per fajna arto! Novan grafikiston ni do havas, kaj ni bonvenigas al samideano

Cristovão Rocha Sousa, kiu akceptis la taskon. Jen du belaj ekzemploj de sindediĉo al la Esperantista laboro kaj idealo!

**PAULO SÉRGIO  
VIANA**


# Pentraĵo sur muro

**ANTÔNIA SOBRAL**

STRATA ARTO

La historio de la pentraĵoj sur muroj ĉiam trairis la historion de la homaro, aŭ pli bone dirite, ili ĉiam iris paralele kaj donis unu la alian signifon al ekzistado.

Post la periodo de la Moderna Epoko (legu la antaŭajn artikolojn en La Lampiro numeroj 151 kaj 155) la murpentarto en la okcidenta civilizacio falis en dekadencan. Tamen komence de la 20-a jarcento la francaj artmovadoj Faŭvismo kaj Kubismo ĝin reaperigis per murpentraĵoj kun ekspresionismaj kaj abstraktaj trajtoj. Citindaj estas la verkoj de Picasso, Matisse, Léger, Miró kaj Chagall.



Henri Matisse | Danco: Studo por la Barnes-Mural (Dua Versio)



Pablo Picasso - Nacia Muzeo - Reina Sofio Arta Centro



Fernand Léger – Abstrakta Mozaiko – Côte d'Azur

Samtempe en Meksiko tiuj pentraĵoj reaperis ankaŭ kune kun fortaj trajtoj politika kaj socia, pro la Meksika Revolucio (1910-20), kiu tie okazas. Meksikaj artistoj vidis en murpentarto la plej bonan manieron esprimi siajn ideojn pri populara nacia arto, engaĝita en la revolucia momento. Tiuj pentraĵoj estis faritaj en publikaj lokoj, rompe kun la tradiciaj, kutimaj kaj limigitaj spacoj kie cirkulis la artaĵoj, kiel galerioj, muzeoj, ktp. Por krei siajn verkojn, la artistoj baziĝis sur la antikvaj majaaj kaj aztekaĵoj, popola arto kaj meksika folkloro de la kolonia periodo, kaj ankaŭ sur la eŭropaj artaj avangardoj, precipe la ekspresionismo. Ili provis rompi

fronte al la akademia arto, krei originalan kaj samtempe modernan, aŭtentike meksikan arton.

Diego Rivera (1886 – 1957) estas la plej fama meksika murpentristo. Li kredis je arto kiel maniero lukti kontraŭ subpremado, kiel revolucia ilo. Li, kune kun José Orozco kaj David Siqueiros, kreis la meksikan murprentraĵan movadon. La trio asertis: “Ni por la stratajn murojn, tiujn de la publikaj konstruaĵoj, de la sindikatoj, de ĉiuj anguloj kie homoj kunvenas kaj laboras.”



David Siqueiros – La Marŝado de la Homaro: la soldatoj de Zapata (Detalo)

En Usono, la murpentrararto aperis en la 1930-aj jaroj, tamen ĝi estis tre mallongdaŭra movado. Malgraŭ tio, ĝuste tie, en Usono, en la 1970-aj jaroj, komenciĝis la Urba Arto. Laŭ Vikipedio: “Strata arto, urba arto aŭ urbanografio, estas esprimoj kiuj rilatas al la artaj manifestiĝoj en publika spaco. Principe temas pri movado subtera.”



Diego Rivera – Industrio de Sukerkano

La Strata Arto estas unu el la plej gravaj kulturaj kaj sociaj manifestacioj de la urbaj popoloj. Ĝi okazis plej ofte en grandaj kaj ĉefaj urbocentroj, kelkfoje per verkoj anonimaj, kiel maniero transdoni kritikajn mesaĝojn, ĉu politikajn, ĉu religiajn, aŭ eĉ rilatajn al sociaj kaj ekonomiaj problemoj. Ĝi entenas diversajn kategoriojn de arto, tio estas, ĉian tipon de kreivaj esprimoj ene de la kolektivaj lokoj. Ekzemple: kantado, muzikala ludado, deklamado, teatrumado, cirka prezentado kaj la surmuraj: afiŝo, videoprojekcio, ŝablono, grafitio kaj pentraĵo – tiuj ĉi tri lastaj estas

objektoj de la artikolo. Ŝablono estas pentrotekniko uzata por desegni sur iu ajn surfaco per farbo, aerosola aŭ ne. La ŝablono estas farita per papero, plasto, metalo aŭ acetato, sufiĉe forta kaj facile tranĉebla por formi la desegnon, kiu povas esti ripetita diversfoje en diversaj lokoj. La mistero kaj anonimeco estas oftaj trajtoj.

Ŝablonoj de Banksy, brita artisto, kiu fariĝis unu el la plej konataj artistoj per ŝablonotekniko en la mondo.


Grafitio origine estis kaligrafiaĵo kaj

konsiderata maniero esprimi arton surstratan, kun intenco celo interveni en la urbon. Multfoje la artistoj konservas la anonimecon.

Murpentajaĵo (foje nomata Muralismo) estas pentraĵo



skribaĉo farita per farbo aŭ aerosolo sur muroj aŭ ajnaj netaŭgaj publikaj surfacoj. Longe vidita kiel vandalismo, grafitio estas nuntempe



Grafitio de Binho Ribeiro – San-Paŭlo, Brazilo



Skribaĉoj, unika en la mondo, trovitaj en la urbo San-Paŭlo, Brazilo



farita intence kiel daŭra ekspozicio. Ĝi diferencas de la aliaj bildaj muraj artoj ĉar ĝi estas profunde ligita al arkitekturo, uzante ĝian surfacon aŭ kreante novan iluzion spacon. Io meritas klarigon: nuntempe ĉiuj tipoj de surstrata pentraĵo estas ĝenerale konsiderataj kiel grafitioj.

Citindaj estas la surmuraj verkoj de la brazila artisto Candido Portinari,



Stokholmo, Svedio: La plej granda pentraĵo sur muro en la mondo



La Ĝemeloj – brazila artisto Eduardo Kobra kiu vivis en la komenco de la pasinta jarcento.

Fine, jen la tridimensiaj pentraĵoj, kiuj ne nur aperas sur muroj sed ankaŭ sur plankoj.

Ĝi ekis en Britio en 1890, kiam pli ol 500 artistoj survivis pere de siaj pentraĵoj sur la stratoj de Londono.

Lastatempe la urba arto fariĝis grava kultura interveno farita de la minoritatoj, kiuj vivas en urbaj centroj kaj avidas montri siajn artojn. Hodiaŭ diversaj strataj pentristoj fariĝis famaj kaj tutmonde konataj, kiel ekzemple Eduardo Kobra, Banksy, La Ĝemeloj kaj Kurt Wenner, ĉi lasta rilate al tridimensiaj artoj. La simpla ideo pentri en publikaj urbaj lokoj iĝis io ja eksterordinara en mondo pli kaj pli murplena kaj ĉirkaŭita de ili. ■



Murpentraĵo en Bijalstoko, Polujo sur kiu aperas Zamenhof.




La Malkovro de la Tero, 1941. Murpentrajo en la Biblioteko de la Kongreso, Vaŝingtono, DC. Detalo:



Grafitiartisto, Bukaresto, Rumanujo



Zamenhof (detalo)



Alia pri Zamenhof en Bjalistoko

# Nia Kongreso

## URBO SAN-KARLO - URBO KONSTRUITA PER KAFO

Fine de la 18a jarcento, pro la malkovro de oro en la regionoj de Cuiabá kaj Goiás, la interno de San-Paŭlo komencis loĝigadi. Multaj homoj ekloĝis en tiu regiono. En la loko, kie hodiaŭ troviĝas la Bieno Conde do Pinhal, loĝis hinda komunumo, kiu plantis tie pinarbojn, donante al la loko la nomon Pinhal. En 1831 okazis la delimito de Sesmaria de Pinhal, posedata de Carlos Botelho, kie estis malgranda vilaĝo, kies loĝantoj plejparte estis de la familio Arruda Botelho. Poste, Antonio Carlos de Arruda Botelho ricevis la titolon Grafo de Pinhal. Ekde tiam, la kafoplantado komenciĝis, kaj la riĉeco kaj fekundeco de la grundo allogis multajn aliajn familiojn, Carlos Botelho revis formi urbon en siaj terpecoj, ideo realigita de lia bofilo, Jesuino José Soares de Arruda kaj liaj heredantoj. En 1865, San-Karlo estis promociita al vilaĝo, kaj en 1880, al urbo. Ĉi tio okazis en la kunteksto de la ekspansio de kafplantejoj, rimarkinda fonto de riĉeco en la lastaj jardekoj de la 19-a jarcento kaj la unuaj jardekoj de la 20-a jarcento. Ankaŭ en ĉi tiu periodo okazis la abolicisma movado kaj la anstataŭigo de la sklavlaboro per la fortlaboro de enmigrintoj. En 1887, plej multaj bienmastroj de San-Karlo komencis memvole liberigi siajn sklavojn, tiel ke, je la alveno de la Ora Leĝo, la sklavoj ekzistantaj en San-Karlo estis malmultaj. En 1889 oni instalas la unuajn telefonajn liniojn, la sekvan jaron, reton por trinkebla akvo, servon de kloakaĵoj, kaj estis la unua urbo en Sudameriko kiu ricevis elektran lumon. São Carlos ricevis germanajn enmigrintojn alportitajn de la Grafo de Pinhal jam en 1876. De 1880 ĝis 1904, la municipo estis unu el la ĉefaj allogaj polusoj de enmigrintoj

el la interno de la ŝtato, la vasta plimulto el nordaj regionoj de Italio. La enmigrintoj laboris en la kafplantejoj, sed dank'al iliaj kapabloj, ili ankaŭ instigis fabrikadon kaj komercadon.

En 1876, San-Karlo postulis la etendon de la fervojo por transporti kafproduktadon, sed la peto estis neita. Do, Carlos de Arruda Botelho tiel, kiel aliaj "kafbaronoj", efektivigis la konstruon per siaj propraj rimedoj, ligante San-Karlo al Rio Claro, kaj de tie al la ŝiphaveno de Santos. Tiam la riĉeco de la kafo ĉesis vojaĝi sur la dorsoj de muloj kaj ekglitis laŭ reloj. La kafokrizo en 1929 trovis San-Karlon preta por la estonteco, urbanizita kaj strukturita. La enmigrintoj sin dediĉis al laboro en komerco, fabrikado kaj konstruado. La kafbaronoj investadis kafprofitojn je diversaj entreprenoj: bankoj, elektro, tramoj, telefonoj, akvosistemoj kaj kloakaĵoj, teatroj, hospitaloj kaj lernejoj. Kun la kono de la enmigrintoj kaj la entreprenumado de la bienestroj, San-Karlo alvenis al la jardeko post 1950 kiel unu el la plej gravaj industriaj polusoj de la ŝtato. En la dua duono de la 20-a jarcento, la urbo ricevis grandan impulson por teknologia kaj eduka evoluo pro la efektivigo de la Lernejo pri Inĝenierarto de San-Karlo, kaj poste la Federacia Universitato de San-Karlo. Hodiaŭ, la urbo havas multajn aliajn instituciojn de teknika kaj supera lernado, esplorinstituciojn, kaj fariĝis grava universitata centro. En la kampo de kulturo kaj amuzo, San-Karlo havas 3 teatrojn, 7 kinejojn, 15 bibliotekojn kaj 5 muzeojn. Kun 240 milo da enloĝantoj, jen la urbo, kiu gastigos la 13-an Esperanto-Kongreson de San-Paŭlo. ■



## Esperantistoj denove kunsidis en la Paraíba Valo

### PAULO SÉRGIO VIANA

**D**imanĉon, la 2-an de junio 2019, denove kunsidis en la Paraíba Valo dudeko da Esperantistoj por amika evento, en la urbo Lorena, ŝtato San-Paŭlo, Brazilo. La Paraíba Valo estas 500 kilometrojn longa regiono inter Rio-de-Ĵanejro kaj San-Paŭlo - la du brazilaj urboj, kie troviĝas plej vigla Esperanto-movado. De kelkaj jardekoj okazas tie entuziasmaj unutagaj Esperantistaj kunsidoj.

Ĉi-foje ĝin partoprenis dudeko da samideanoj el 9 urboj. Oni aŭskultis prelegojn pri Turismo en tiu regiono (Cristina Graaf) kaj Filozofio de Scienco (Aleksandro Prado), kaj oni

diskutis pri la Esperanto-movado en Rio kaj San-Paŭlo. Krome, oni aŭskultis la tradician “Guton da Gramatiko” kaj longe diskutis pri la fundamentaj pedagogiaj principoj por instruado de Esperanto (Wilian Gomes). La programon kompletigis spektado (kaj diskuto) de filmeto kaj kelkaj didaktikaj ludoj, kiuj celis montri rimedojn por vigligi lecionojn kaj klubkunvenojn.

En la matena parto de la evento, la Sekretario de Kulturo kaj Turismo de Lorena, S-ro Roberto Bastos venis antaŭ la Esperantistojn por saluti kaj bonvenigi ilin. ■





## Retejo por trafa informo pri Esperanto

**E**speranto.net estas grava rimedo por diskonigi nian lingvon kaj movadon. Ĝin kreis Universala Esperanto-Asocio, por provizi bazajn informojn pri Esperanto, lerni ĝin kaj kontakti landajn, regionajn aŭ lokajn asociojn. Tiuj informoj estas disponeblaj en 66 lingvoj. En la retejo troviĝas aliro al libroj, filmoj, novaĵoj, elsendoj, kaj pri la agado “Amikoj de Esperanto”. Abunda materialo atendas vin por trafa informo pri la Internacia Lingvo. Ni uzu ĝin! ■

## Kulturkunveno

### Internacia gasto

**L**a ĉeestantoj de la maja kulturkunveno havis la plezuron akcepti hungaran vizitanton, s-anon Istvan Kobok, kiu parolis pri sia lando, en plaĉa kaj flua Esperanto, kiu ravis la aŭskultantaron.

Fine de sia prezento li respondis al diversaj demandoj starigitaj de la scivolema publiko. La kulturaj kunvenoj okazas en la lasta sabato de ĉiu monato en la sidejo de EASP, ekde la 16h. ■

## Revuo "Esperanto" Voĉlegata

**L**astatempe oni revivigis en la paĝaro de Universala Esperanto-Asocio la aperigon de voĉlegitaj versioj de la ĉefa organo de la asocio: “Revuo Esperanto”. Teamo de legantoj el pluraj landoj faras la tutan materialon tre interesa, pro la diversaj akĉentoj. Ĝenerale la elparolo estas klara, ne tro rapida kaj viveca. Kelkajn sondosierojn akompanas ankaŭ la koncerna teksto. Tio signifas, ke la iniciato, kiu komence celis vidhandikapitojn, tamen ankaŭ povas esti utila por progresantoj, kiuj emas plibonigi sian komprenkapablon. Cetere, la enhavo de la revuo enkondukas la legantojn-aŭskultantojn en nian kulturon kaj medion.

Jen bela iniciato! Se vi emas helpi per legado, kontaktu la koncernan estraron de UEA. ■



Foto: S-ano Istvan Kobok (dekstre) transdonas kelkajn librojn al la prezidanto de EASP, Genildo M. Coelho

# Iom da poezio... ...kaj tradukarto

Francisco Weschler

Soneto XXXVII en Pulvis, Alphonsus de Guimaraens, p.435

Neniu pli ol mi sekvadas Dion,  
Neniu Lian volon pli komprenas.  
Neniun ajn mi benas, nek malbenas:  
En ĉi brusto doloro murdis ĉion.

Ninguém anda com Deus mais do que eu ando,  
Ninguém segue os seus passos como sigo.  
Não bendigo a ninguém, e nem maldigo:  
Tudo é morto num peito miserando.

La sunon, lunon kaj konstelacion  
Majesta tomo en ripozo tenas.  
Mistera Dia mano falĉe prenas  
Iam semitan de Li grenostrion.

Vejo o sol, vejo a lua e todo o bando  
Das estrelas no olímpico jazigo.  
A misteriosa mão de Deus o trigo  
Que ela plantou aos poucos vai ceifando.

La horoj pasas per serena fluo.  
Unu tagon (en foro aŭ proksimo?)  
Suferoj ĉesos sen turmenta skuo.

E vão-se as horas em completa calma.  
Um dia (já vem longe ou já vem perto?)  
Tudo que sofro e que sofri se acalma.

Ho venu baldaŭ la fina sublimo!  
Mi eklumos, ĉar sub ĉiela bluo  
Fariĝos Dia gren' mia animo...

Ah se chegasse em breve o dia incerto!  
Far-se-á luz dentro em mim, pois a minh'alma  
Será trigo de Deus no céu aberto...



## “Rotario unuigas talentojn kaj ideojn kun la celo krei daŭripovajn plibonigojn en la mondo”

La 19-an de Aprilo 2019, inter aliaj prelegoj kadre de Bel-Konferencoj, oni prezentis la Rotarian E-Klubon de Esperanto-Brazilo. Tuj ekkomenciĝis scivolemaj demandoj: Kio estas Rotario? Kion faras Rotario?

Rotario kaj Esperanto naskiĝis paralele, komence de la pasinta jarcento, kaj havas plurajn similajn trajtojn, inter kiuj la idealisman, volontulan agadon konsciigi la homan socion elimini solidare la grandajn problemojn en iliaj diversaj sociaj aspektoj. Ekzemple: homaj rajtoj en justa komunikado, ĝenerala edukado kaj humaneca volontula helpo per la realigo de daŭripovaj ŝanĝoj.

La homa genetiko estas kampo de profundaj studoj, el kiuj rezultas, ke volontulado, ĉu sporada, ĉu regula, pozitive influas la personecon, kreas memestimon, optimismon, solidarecon kaj amikecon, forigas depresion, kaj sendube plibonigas la suferadojn de la homaro. Helpi al aliaj homoj estas ideo en ĉies mensoj, sed multaj homoj ne trovas taŭgan lokon por travivi tiujn sentojn helpi al aliuloj.

En 1905 kelkaj profesiuloj kreis grupon por amikiĝi, ekster korporaciaj aŭ religiaj interesoj, kaj kune helpi al la loka socio por ke la mondo estu pli solidara. Tiel naskiĝis la hodiaŭ tutmonda ROTARY INTERNATIONAL en la urbo Chicago, Usono.

Membrigi en rotaria klubo signifas investi en vian ĝeneralan kulturon pere de partopreno en klubaj programoj kaj per volontula laboro realigi edukajn kaj humanecajn projektojn kun homoj kiuj havas viajn samajn idealojn. La Rotaria Fondajo investas ĉiujare grandajn financajn kontribuojn al edukaj kaj humanecaj projektoj ĉie en la mondo, kie rotarianoj volontulas.

Rotarianoj devontigas sin realigi la idealon de servado en privata, profesia kaj publika vivo; progresigi la internaciajn

rilatojn, solidarecon kaj Pacon per tutmonda amikeco inter profesiuloj ligitaj per la idealo de volontula servo; vivi altan etikan nivelon en sia profesio kun respekto al ĉiuj utilaj laboroj.

Esti rotariano sendube estas privilegio, al kiu oni sin donis, sed privilegioj estas akompanataj evidente de respondecoj, kaj vivi virtuale en internacia grupo kun malsamaj kulturaj fonoj, estos sendube por ĉiu membro riĉiga kaj entuziasmiga.

Kiel membro de klubo kaj montrante vian membrokarton vi rajtas viziti kaj esti amike akceptata en ĉiu ajn el la 35.833 rotariaj kluboj en la mondo, kiuj unuigas 1.218.671 membrojn en ĉiuj nacioj de nia planedo. Lokaj, naciaj kaj internaciaj konferencoj akceptas vin plezure en amikaj rilatoj.

En 1928, Esperantistoj, membroj de diversaj tradiciaj Rotariaj kluboj en la mondo kaj loĝantaj en diversaj landoj, organiziĝis, kreante Internacian grupon de amikoj (RADE). Poste aperis aliaj grupoj kun aliaj specifaj interesoj, kiuj, hodiaŭ sumas pli ol sesdek grupojn.

RADE (Rotaria Amikaro de Esperantistoj) aktivas ĝis nun, kaj el ĝi naskiĝis la Rotary E-Klubo de Esperanto en Italio (2014) kaj nia Rotaria Klubo de Esperanto-Brazilo (2017). En Universalaj kongresoj de UEA, RADE tradicie havas sian informstandon dum la movada foiro, kie kunvenas rotarianoj el la tuta mondo.

Rotaria Klubo de Esperanto-Brazilo arigas esperantistojn el dek landoj: Brazilo, Kanado, Usono, R.D.Kongo, Pollando, Germanujo, Italio, Svedio kaj Emirlandoj. Sed la elektronika Klubo apartenas administracie al la brazila distrikto 4560, en la sudo de Minas Gerais.

Ĉu vi deziras koni pli pri Rotario kaj eventuale esti invitita al membriĝo Vizitu la adresojn:

[www.rotary.org/pt](http://www.rotary.org/pt)

<http://esperantorotary.org/>

<https://rotaryclubdesesperantobrasil.org/>

aŭ petu pliajn informojn ĉe la sekretarioje [ursula.eclub@gmail.com](mailto:ursula.eclub@gmail.com)

Kore

Úrsula Grattapaglia

**ANNA LOBO**

PRI KINO KAJ ALIAJ ARTOJ

**XXY**

Originala nomo: XXY

Direktoro: Lucia Puenzo

Aktoroj: Inés Efron, Ricardo Darín, Martín Pirojansky

Landoj: Francio, Hispanio kaj Argentino

Tipo de filmo: Dramo

Tempodaŭro: 1h 31 min

Ĉi-ĉnumere, la filmo havas tre tikan temon - Intersekseco. Mi esploris longe pri alternativaj eŭropecaj filmoj ĉe Netflix, kaj tiu ĉi estis unu el tiuj, kiuj vekis mian atenton. Mi estas sentema pri minoritatoj kaj seksemeco. Mi ŝatas esplori pri la temo cele al dono de respekto kaj de plej bonaj vivkondiĉoj al personoj, kiuj taksas sin en tiuj kadroj. Tial, mi ege entuziasmiĝis, kiam mi malkovris tiun filmojn por spekti, kaj eĉ pli pro

tio, ke unu el la aktoroj estas la brila argentinano Ricardo Darin. La filmo komenciĝas per familio de kuracisto, kiu venis paroli kun Alex, interseksa adoleskanto, pri la ebleco, ke ŝi submetiĝu al kirurgio por havi nur unu generilon. La familio de Alex, kiam malkovris ke la filo estas interseksulo, decidis krei sian idon pli kiel inon, sed, tamen ke la fina decido pri kirurgio aŭ kion fari estas nur de la filo mem, kiam pli aĝa. Meze de tio, Alex trapasas siajn



seksemecajn malkovrojn, pripensas sian identecon kaj kion li emas por sia vivo.

**A**rteco dum filmado estas mirinda, kaj plena je tre belaj kortuŝaj scenoj. Ines Efron kaj Ricardo Darin, respektive Alex kaj ŝia patro Kraken, ege bone aktoras. Ankaŭ elekto de la loko en kiu la historio disvolviĝas estas speciala. Aldone al ĉio tio, la filmo alportas tre bonajn demandojn, kiel: Ĉu pli bone kirurgiĝi kiam infano aŭ ne? Ĉu vere necesas decidi, ĉu esti femino aŭ

masklo? Ĉu lasi naturan disvolviĝon ne estas unu ebleco? Mia vidpunkto estas, ke ne gravas kion oni decidas, la elekto ĉiam estas pli bona, kiam farata de la koncerna ulo, kaj ni nur povas apogi aŭ helpi la elekton. Pli grave ol ĉio, tiu estu feliĉa. Mi invitas vin demeti la infanojn de la ĉambro - Mi indikos aliajn filmojn taŭgajn por ili - kaj akompanu iom pri la historio de tiu eksterordinara Alex! Bonan spektadon! ■

Kiam li vekigis, li diris al sia edzino:

- Aŭskultu, kara: hodiaŭ estas tago por pagi la monatan ŝuldon de la televido, alvenos la ulo kun la kvitancilo, certe. Sed okazas, ke hieraŭ mi gajnis neniom da mono, mi estas tute sen.

- Klarigu tion al la homo - konsideris la edzino.

- Al mi tio ne plaĉas. Ĝi aspektas kiel malhonestajo, mi emas severe plenumi miajn devojn.

Aŭskultu: kiam li alvenos, ni restu silentaj ĉi tie, interne, ni ne bruu, tiel li supozos, ke neniu troviĝas endome. Lasu, ke li frapu, ĝis laciĝo - morgaŭ mi pagos.

Ion poste, li demetis la pijamon, alpaŝis al la banĉambro por baniĝo, sed la edzino jam estis enŝlosita en la banejo. Dum li atendis, li decidis prepari kafon. Li almetis akvon por boligo kaj malfermis la enirpordon por preni la panon. Ĉar li estis tute nuda, li zorge rigardis unuflanken, aliflanken, antaŭ ol riski du paŝojn al la pakajeto lasita de la panportisto sur la ŝtono de la parapeto. Estis ankoraŭ frumatene, certe neniu aperos. Tamen, apenaŭ liaj fingroj tuŝis la panon, jen la pordo malantaŭ li fermiĝis brue, puŝite de vento.

Terurite, li rapidis al la tintilo, tuŝis ĝin, atendis, angore rigardis ĉirkaŭen. Li aŭdis, ke interne la brueto de la duŝa akvo subite ĉesis, sed neniu malfermis la pordon. Certe lia edzino pensis, ke tio estas la ulo de la televido. Li frapis per la fingronodeto:

- Maria! Malfermu, Maria. Estas mi - li vokis mallaŭte.

Ju pli li frapadis, des pli da silento interne.

Dume, ekaŭdiĝis malsupre, ke la pordo de la lifto fermiĝis, li vidis, ke la montrilo malrapide supreniras laŭ la etaĝoj... Ĉi-foje, tio certe estis la ulo de la televido!

Ne estis ĉi tiu. Li sin kaŝis en la interspaco de la ŝtuparo inter la etaĝoj, atendis, ke la lifto preterpasu, kaj revenis al la pordo de sia apartamento, ĉiam tenante en la maltrankvilaj manoj la panpakajon:

- Maria, bonvolu! Estas mi!

Ĉi-foje li ne havis tempon por insisti: li aŭdis paŝojn sur la ŝtuparo, malrapidajn, regulajn, el malsupre... Kaptite de paniko, li rigardis ĉirkaŭen, piruetis, kaj tiel, senvesta, kun la pakajo en la mano, li aspektis, kvazaŭ li plenumus groteskan, mistrejnitatan baleton. La paŝoj sur la ŝtuparo alproksimiĝis, kaj li ne trovis lokon por sin kaŝi. Li alkuris en la lifton, premis butonon. Tio estis la preciza tempo por malfermi la pordon kaj enveni, kaj servistino pasis, malrapide, kaj komencis supreniri unu plian ŝtuparoparton. Li pli facile spiris, li sekigis la ŝviton sur sia frunto per la panpapero.

Sed jen la interna pordo de la lifto fermiĝis kaj ĝi ekdescendis.

- Ho ne! - veis la nudulo, timegigita.

Kaj nun? Iu homo malsupre malfermos la pordon de la lifto kaj ekvidos lin, tie, tute nuda, eble li estos konata najbaro... Li kapturiniĝinte rimarkis, ke li estas portata pli kaj pli malproksimen de sia apartamento, ke li travivas premsonĝon Kafkecan, ke tiumomente instaliĝas plej aŭtentika kaj freneza Terora Reĝimo!

- Ho ne! - li furioze ripetis.

Li kaptis la pordon de la lifto kaj malfermis ĝis perforte inter etaĝoj, kaj devigis ĝin halti. Li profunde spiris, fermis la okulojn, por ekhavi la momentan iluzion, ke li sonĝas. Poste li provis premi la butonon de sia propra etaĝo. Malsupre iu homo plu kaj plu provis venigi la lifton. Antaŭ ĉio ajn: "Urĝo: haltigo". Tre bone. Kaj nun? Ĉu ĝi supren aŭ malsupren moviĝos? Zorgeme li malŝaltis la butonon por urĝo, lasis la pordon moviĝi, dum li insistis, ke la lifto supreniru. La lifto supreniris.

- Maria! Malfermu la pordon! - li kriis, ĉi-foje li pugnofrapegis la pordon, jam sen ia prudento. Li aŭdis, ke alia pordo malfermiĝis malantaŭ li.

Li turnis la korpon, premite, apogante la postajon sur la pordokadron kaj senutile klopodante kovri sin per la panpakaĵo. Tio estis la maljunulino de la najbara apartamento:

- Bonan matenon, sinjorino - li diris, konfuzite. - Imagu, ke mi...

La maljunulino, ŝokita, levis la brakojn kaj kriis:

- Helpu min Dio! La panportisto estas nuda!

Aliaj najbaroj aŭdis la kriadon kaj alvenis por vidi, kio okazas:

- Li estas maldeculo!

- Vidu, kia teruraĵo!

- Ne rigardu tion, filino! Iru en la domon!

Maria, la edzino de la malfeliĉulo, fine malfermis la pordon por vidi, kio okazas. Li enpafiĝis kiel raketo kaj rapidege sin vestis, kaj eĉ ne memoris sin bani. Post kelkaj minutoj, kiam ekstere refariĝis la trankvila etoso, iu frapis la pordon.

- Certe tio estas la polico - li diris ankoraŭ spiregante, kaj li malfermis la pordon.

Ne; tio estis la ulo postulonta pagon de la televido.

(Esperantigis P.S.V.)

Noto:

Fernando Sabino (1923-2004) naskiĝis en la ŝtato Minas Gerais kaj okupis apartan lokon en la brazila literaturo. Li verkis etajn rakontojn, kronikaĵojn kaj romanojn, per kiuj li perfekte kaptis la spiriton de la brazila popolo. "Nuda Viro" famiĝis ankaŭ pro tio, ke oni faris sukcesan filmon (1997), inspiritan je ĝi.

## MANIFESTO

AnaMari Souza

Esperantigita de James Rezende Piton

Kvar punktojn havas mia religio  
 Mi faras ilin mia agado, mi faras ilin mia filozofio  
 Vivu, kreu, amu kaj faru  
 Tio estas ankaŭ mia konfesio.  
 Vivu vian filozofion, amu vian arton  
 Fidu vian religion kaj faru vian parton  
 Sed ne uzu vian religion por subfosi aliulon  
 Ni estas sep miliardoj da mensoj en la mondo  
 Kaj voli, ke la tuta mondo kreu je la samo  
 Signifas minimume frenezan postulon.

Mi respektas ĉiun, kiu fidas  
 Mi respektas ĉiun, kiu kredas je Dio  
 Mi respektas ĉiun, kiu transvidas  
 Mi respektas ĉiun, kiu kredas je nenio.

Mi ŝatas tiun, kiu fidas je verso,  
 Mi ŝatas tiun, kiu fidas je si mem,  
 Mi ŝatas tiun, kiu fidas je l'universo,  
 Kaj mi ŝatas tiun en vagem'.

Brakumon al tiu de la scienco,  
 Brakumon al tiu de Kristo,  
 Brakumon al tiu de la arto  
 Kaj brakumon al tiu, kiu nomas sin ateisto

Ŝalom al tiuj de ŝalom,  
 Amen al tiuj de amen,  
 "Blessed be" al tiuj de la magio,  
 Kaj amon al tiuj de la amplen'.

Religia maltolerem' estas kontraŭdiro,  
 "Religio" fontas el la latina 'religare', la unuiga inspiro  
 Do ĉesu dividi la mondon inter tiuj, kiuj iros kaj kiuj ne iros  
 al la Paradizo  
 Nia mondo plene malsanas dum ni perdas tempon kverelante pri  
 devizo  
 Anstataŭ dividi la religiojn inter tiuj de la malbono kaj tiuj  
 de la bon'  
 Kial vi ne enpoŝigas vian ideologion kaj helpas al tiu ulo  
 Kiu sub malvarma nulo mortas surstrate sen person'?  
 La grandaj majstroj jam diris, ke ni devas esti Unio,  
 kial do ne fari la respekton ankaŭ religio?

# Ni ne atendu malesperiĝon por havi kuraĝon

**JOSÉ MAURO PROGIANTE**

**E**stas tre amuza la rakonto “Kuraĝo”, trovebla en la retejo *Facila Vento* (<http://facila.org/?p=336>).

Ĝi temas pri viro, kiu luktis kontraŭ krokodilo kaj pro tio rajtis ricevi milionon da dolaroj. Tiu premio estis proponita de riĉulo, kiu intencis vidi, ĉu ankoraŭ estas kuraĝulo en lia lando.

Leginte tiun rakonton, ni dubas, ĉu la rezulto de la defio kontentigis la riĉulon, ĉar en la afero miksiĝis alta dozo da malesperiĝo. La vorto “kuraĝo” devenas de la

latina *cor* (koro), ĉar la romianoj opiniis, ke la kuraĝo rilatas pli al la koro, ol al la racio. En la filozofio estas diskuto, ĉu ĝi povas esti rigardata kiel virto, ĉar ne nur bonaj homoj montriĝas kuraĝaj. Laŭ Voltero, ĝi estas ne virto, sed kvalito, kiun povas havi kaj la grandaj homoj, kaj la krimuloj. Fakte la kuraĝo, same kiel la inteligenteco kaj la forto, povas utili al la bono aŭ al la malbono. Tamen, ĉar ĝi estas la distinga eco de herooj, ĝi estas ĉiam admirata, tiel intense kiel estas abomenata ĝia malo, la



Frank Lukasseck

poltroneco.

**E**stas evidente, ekzemple, ke teroristo agas kun kuraĝo kiam li faligas aviadilon, en kiu ankaŭ li estas. Tamen, la kuraĝo estas virto nur kiam la kuraĝulo uzas ĝin ne egoisme, por helpi aliulon aŭ defendi ĝeneralan noblan aferon. La virta kuraĝulo estas tiu, kiu racie alfrontas la danĝeron celante la bonon. Kadre de la moralo, la plej grava trajto de kuraĝo estas tio, ke ĝi estas necesa por la efektiviĝo de la aliaj virtoj. Ĉu valorus ami, sen kuraĝo sinoferi por savi la amaton el danĝero? Kuraĝo ne estas manko de timo, sed kapablo alfronti kaj superi la timon. Ne estas kuraĝo, kiam oni agas sciante, ke ne estas danĝero. Primitivulo povas elmontri kuraĝon dum eklipso, sed civilizito ne. Kiel ĉiu virto, la kuraĝo manifestiĝas en la estanteco, tio estas, kiam oni estas antaŭ la danĝero, reala aŭ imagita. Ne estas kuraĝulo tiu, kiu diras, ke li alfrontos estontan danĝeron. Tamen, ankaŭ estas kuraĝo la kapablo elteni la malfeliĉon de la nuno, kiu plu daŭros, kaj kies kaŭzoj estas neŝanĝeblaj, kiel pasintaj misagoj, forpaso de familianoj aŭ nekuraceblaj malsanoj. Kaj intelekta kuraĝo estas la rifuzo, en sia penso, cedi al la timo kaj submetiĝi al alia

afero krom la vero. La kuraĝulo alfrontas la danĝeron, kiu aperas, sed li ne serĉas ĝin. Estas bele riski la vivon altruisme, sed ne pro bagateloj aŭ pro nura amo al la danĝero. Kiam oni luktas, ju malpli granda estas la espero pri la venko, des pli granda estas la kuraĝo. Kaj ĉi tiu estas eĉ pli granda, kiam la malvenko estas certa, kiam oni scias, ke la danĝero estas nesuperebla. Revenante al la rakonto menciita en la komenco, estas interese observi la rilaton inter kuraĝo kaj malespero. La kuraĝo estas necesa por elporti la malesperon, tamen aliflanke la malespero ofte estigas la kuraĝon. Sciante tion, la militistoj evitas meti la malamikon en malesperigan situacion, por ne multobligi lian forton. En la okazo de la viro, kiu luktis kontraŭ krokodilo, se vi legos la tutan rakonton, certe vi ridos, ĉar ĝi estas vere amuza, sed eble ankaŭ vi dubos, kiel la riĉulo, ĉu la gajninto indas esti admirata pro sia kuraĝa faro.

Ĉiutage, en niaj agoj kaj pensoj, ni estu pretaj defii la danĝerojn, celante la bonon kaj ne atendante la malesperiĝon, por ke ne restu dubo pri la virteco de nia kuraĝo. ■



# Psikologio

PRI LA GRAVECO KONI SIN MEM

**ISIS C. OKABE PITON**

Paulínia-SP

— *Gnōthi seauton* (“Konu vin mem”) -  
*Sokrato (laŭ Platono)*

**L**aŭ socia vidpunkto, la infanoj estas nesociigitaj homoj. Pro tio ni devas instrui al ili kiel agi, kia sinteno estas akceptebla por la socia kunvivado al kiu li aŭ ŝi apartenas. Dum tiu procezo en ies parto de la vivo, oni konstruas sian personecon eltirante gravajn partojn de Oniaj sentoj, same kiel oni plibonigas fotojn en komputila programo.

Sentoj kiel malamo, envio, timo, inter aliaj, estas forigataj, kvazaŭ neniuj homo havas tiajn sentojn. Oni kaŝas ilin kaj ĝis tiu punkto, ke oni ne PLU rekonas sin mem, oni komencas kredi je la masko, kiun oni kreas por kunvivi kun la socio. Nur bona, nur amema, nur trankvila, simple naive neante “malbonajn sentojn”, sed nia mensa meĥanismo eltiras ilin el la nekonscio kaj tiamaniere komencas projekcii ilin en la aliajn homojn, tiujn sentojn, kiuj estas kaŝitaj de si mem.

Kiam estas iu sinteno de alia homo, kiu tre ĝenas nin, oni parolas kaj

pensas pri la ago de la alia. Tio montras, ke la sinteno de la alia respreguliĝas en ni, tiu sinteno ankaŭ iel estas en ni, sed, ĉar oni ne akceptas kaj nekonscie ne volas rekonu la senton en si mem, oni projekcias en la alian kaj tiel oni tre malfacile sukcesas esti tolerema kun la aliulaj eraroj.

Se tiaj sentoj estas komprenataj kiel “malbonaj sentoj” dum nia kreskado kaj se eĉ en si mem oni ne kapablas akcepti ilin, kiel akcepti kaj esti komprenema kun la aliaj? Pro tio gravas, ke oni lernu pri si mem, rekonu la “ombrojn”, kiel diras la psikanalizisto Carl Jung, oni rekonu aspektojn de nia personeco, kiujn oni ne konscias. Indas aŭskulti la plendojn de tiuj, kiuj amas nin kaj eĉ tiujn de malamikoj. Oni devas flankenmeti la manieron kiel la alia parolis kaj sincere pensi: ĉu laŭ iu aspekto oni diras la veron pri mi? Ĉu estas io, kion mi devas plibonigi en mi, anstataŭ nur kontraŭataki por min defendi, nur eblas koni min mem pere de la kunvivado kun



diversaj malsamaj homoj.

**P**or komenci rekoni ilin, ni devas pripensi niajn agojn dum la tago, la sentojn, kiujn ni sentis dum niaj ĉiutaga travivado. Tiel eblas ekrekoni ilin, kaj la bonajn (socie akcepteblajn) kaj la malbonajn (kiujn ni ne akceptas kaj kaŝas de ĉiuj kaj de ni mem). Unue ni devas lerni, ke ĉiuj sentoj gravas por ni. La malamo donas al ni forton por diri ne aŭ esti pli rifuzema al homoj, kiuj ne

komprenas limojn. La envio devas esti la forto por fari, ke ni moviĝu por laboro kaj atingu ion, kion ni vidis ĉe alia homo kaj kion ni kredas ankaŭ bona por ni. La timo gravas por ke ni ne riskigu nin en danĝeroj sennecese.

Ni devas kunvivi harmonie kun niaj ombroj, “levi la blankan flagon” al ili, por lerni kiel bone uzi tiujn favore al ni, kiel forto kaj grava aspekto de la personeco. ■

## **Convite para o 13º Congresso Paulista de Esperanto**

Nos dias 12 e 13 de outubro acontecerá o Congresso Paulista de Esperanto na cidade São Carlos. Dois importantes centros culturais e históricos vão sediar as palestras, oficinas e apresentações artísticas do congresso.

Localizada no centro geográfico do estado, a cidade de São Carlos possui características especiais que a tornam um local de destaque sob vários aspectos. O clima ameno faz de São Carlos um local muito agradável, com inúmeras cachoeiras, curiosas formações geológicas e belíssimas paisagens. Quem passa pelas ruas e estradas do município pode perceber aqui e ali pontos e prédios históricos, ou importantes centros tecnológicos, onde se desenvolve o futuro.

Esta é uma excelente oportunidade para sair da rotina, encontrar amigos e praticar o Esperanto. Venha mergulhar na língua universal e passar um fim de semana nessa cidade hospitaleira.

## **Invito al 13-a Esperanto-Kongreso de la Ŝtato San-Paŭlo**

En la tagoj 12-a kaj 13-a de oktobro 2019 okazos plia E-Kongreso de la ŝtato San-Paŭlo, ĉi-foje en la urbo São Carlos. Du gravaj kulturaj kaj historiaj centroj gastigos la prelegojn, metiejojn kaj artajn prezentojn de la kongreso.

Lokita en la geografia centro de la ŝtato, la urbo San-Karlo havas specialajn trajtojn kiuj igas ĝin elstara loko en pluraj aspektoj. La milda klimato igas San-Karlon tre agrabla loko, kun multaj akvofaloj, kuriozaj geologiaj strukturoj kaj belaj pejzaĝoj. Tiuj, kiuj trapasas la stratojn kaj aŭtovojojn de la komunumo, povas percepti tie kaj alie historiajn punktojn kaj konstruaĵojn, aŭ gravajn teknologiajn centrojn, kie la estonteco disvolviĝas. Jen bonega okazo por foriri el la rutino, renkonti amikojn kaj praktiki Esperanton. Venu plonĝi en la internacian lingvon kaj pasigi semajnfinojn en ĉi tiu gastema urbo.

# 13<sup>o</sup>

# Congresso Paulista de Esperanto

São Carlos/SP: 12 - 13 outubro 2019

Local do evento:

Escola Estadual Doutor Álvaro Guião

Av. São Carlos, 2190 - Centro

<http://easp.org.br/congresso>

Realização:



Esperanto-Asocio de São Paulo

Contato com a  
organização local:

Gilberto Menegasso

(16) 3307-1132

menegasso.gilberto@gmail.com

Apoio cultural:



**CEMAC**  
CENTRO MUNICIPAL DE ARTE E CULTURA



Prefeitura de  
**SÃO CARLOS**